

ILEI – Komitatkunsidoj – Julio 2013 – Sieber  
Kunsido 2<sup>a</sup>, 15a de julio, 9h00-10h30

ILEI-KONFERENCO 2013  
SIEBER – HERZBERG  
TAGORDO

1. DISKUTO PRI LA RAPORTOJ
2. SENŜARĜIGO DE LA ESTRARO POR 2012
3. REKONSISTIGAJ ELEKTOJ
4. SEKCIOJ ALIĜPETOJ PLUVIVIGO
5. KOMISIONOJ : RAPORTOJ, EV. STARIGO
6. FINANCOJ
7. ELDONADO, INFORMADO, KOMUNIKADO
8. MEMBRO-ADMINISTRADO
9. MODULA INSTRUISTA TREJNADO
10. DULINGVAJ INFORMILOJ
11. KOMITATANO A CHE UEA
12. STRATEGIO - PRIORITATOJ
13. CETERAĴOJ

La proponita tagordo por la du sekvaj sesioj estis akceptita.

Daŭra diskutado pri la raportoj traktitaj dimanĉon estis invitita. Kvankam la Komitato traktis la raportojn dimanĉon, eblis daŭra diskutado pri ili, kaj la Komitato ankoraŭ ne voĉdonis pri la financa raporto.

Alvenis de sekretario Radojica Petrovic jenaj tri dokumentoj :  
tagorda propono, sekretaria jarraporto kaj dokumentoj pri la alighpropono por Sudafrika sekcio.

1. Rilate financojn, kvankam principe bankokontoj kaj revizoroj estu en la sama lando kiel la kasisto, oni konsideru la eblon ŝanĝi la statuton pro tio ke bankaferojn oni povas transnacie trakti rete. La nova kasisto efektive nenion ricevis papere rilate financojn de la Ligo. Pro la ŝanĝo en la kasista ofico, duono de la jarlaboro por 2012 okazis en Nederlando kaj duono en Usono. La kasistaj raportoj ne estas kontrolitaj de reĝisoro, sed la nederlandaj kontrolantoj sufiĉos por 2012 ĉar la nova kasisto eklaboris dum la unua jaro 2013.

Dum la diskuto, oni esprimis ghojon ke ni havas firman kasistan pozicion, kun la anstataŭigo de Julija Batrakova per Vilĉjo Harris.

***Propono 5<sup>a</sup>***

Akcepto de la financa raporto.

Sub kompreno ke la raportoj ne estas kontrolitaj de reĝisoro, kaj ke eble du-tri ciferoj devos esti modifitaj post esploro, la raporto estis unuanime akceptita, per 32 voĉoj.

**Aprobata.**

## 2. Senŝarĝigo de la Estraro

### ***Propono 6<sup>a</sup>***

Sendiskute akceptita, unuanime per 32 voĉoj. **Aprobata.**

## 3. Rekonsistigaj elektoj

Stefan MacGill klarigis, ke ekde la momento de la senŝarĝigo, Zsófia Kóródy kaj li demisias de la estraro por lasi liberajn lokojn, por ke la Komitato povu libere rekonsistigi la Estraron. Zsófia jam esprimis sian intencon resti kiel aganta prezidanto nur ĝis la Komitat-kunsido. Mirejo esprimis sian pretecon kandidatiĝi por prezidanto jam en 2012: ni povus eĉ nun akcepti alian kandidaton, sed neniu konfirmis intereson..

Estas en la estraro sep, t.e. minus du, do estos alelekteblaj novaj kandidatoj.

Zsófia Koródy kaj Stefan MacGill transdonis siajn al la givda teamo Monique Arnaud kaj Marc Cuffez, ĉar neniu el la Elektokomisiono ĉeestis.

Mirejo prezentis detalojn pri sia kandidatiĝo kaj forlasis la ĉambron. La posta diskutado inter la Komitatoj reliefigis faktorojn kiuj subtenis la kandidatiĝon de Mirejo interalie laŭ ŝiaj sperto, solida kaj efika laboro en kaj por ILEI, kaj preteco dediĉi tempon kaj energion al la tasko.

Manke de alia kandidato okazis la voĉdonado pri Mirejo por la prezidanta ofico.

### ***Propono 7<sup>a</sup>***

Ke Mireille Grosjean estu elektita la nova Prezidanto de ILEI.

Voĉoj *por* Mirejo **34**, 1 kontraŭ, kaj 1 sindeteno.

**Mireille Grosjean elektita Prezidanto de ILEI.**

Estas rimarkinde ke ILEI nun ne nur havas Prezidantinon, sed ke ses el la naŭ estraranoj estas virinoj, signifa ŝanĝo en la historio de la Ligo.

Mirejo sekve parolis pri aspektoj de la estonta laboro pri kiuj ŝi aparte interesiĝas.

### ***Propono 8<sup>a</sup>***

4. Voĉdono pri la aliĝo de la Sudafrika Asocio

**La aliĝpeto estis unuanime aprobata.**

Kun la aldono de Sudafriko, ILEI nun havas 35 sekciojn, 12 reprezentantojn kaj 9 kontaktpersonojn, do piedojn en 55 landoj. Tiu statistiko estas utila por niaj rilatoj kun UNESKO kaj aliaj internaciaj organizoj.

La Koleghelpa kaso devos helpi kelkajn sekciojn pluvivi. Se sekcioj restas neaktivaj eĉ post instigo kaj helpo, ni eble devos forigi ilin, tamen ni daŭre laboru por helpi trovi solvon al iliaj problemoj.

La Ligo havas 5 Komisionojn

Pro tio ke Mirejo ne povas plu prezidi la Internacian Ekzamenan Komisionon, ŝi proponis kiel prezidanton Karine Arakeljan, kiu estis tre aktiva en Kongresoj kaj

povos daŭrigi kontentige la laboron de la IEK. Monika Molnar estas preta resti kiel vicprezidanto de IEK, kaj Mirejo pretas resti en la Komisiono kiel membro. La konsisto de IEK devas esti aprobata ankaŭ de la Komitato de UEA venontsemajne.

***Propono 9<sup>a</sup>***

La propono de Mirejo rilate la konsiston de la IEK estis **unuanime aprobata**. Neniu ŝanĝo en la aliaj Komisionoj.

Estis diskuto pri kontrolado de financoj, oni konstatis la fakton, ke oni devas fari tion en la koncernaj landoj, kie ILEI havas kontojn.

***Propono 10<sup>a</sup>***

Ke Bharat Ghimire estu Komisiito pri aliĝpetoj.

Bharat akceptis, neniu kontraŭis. Unuanime **aprobata**.

Horoj estis interkonsentitaj pri kunsidoj de laborgrupoj (dulingva faldfolio, MITE) dum la konferenco.

Protokolis: Duncan Charters, 2013-7-18